



A quarterly organ of the Esperanto Association of Britain
Kvaronjara organo de Esperanto-Asocio de Britio
No. 50, July–September 2010 ★ N-ro 50, julio–septembro 2010

ISSN 1741-4679

International communication without discrimination ★ Respect for all cultures
Internacia komunikado sen diskriminacio ★ Respekto por ĉiuj kulturoj

New book to awaken intellectuals and politicians

Une colonie ordinaire du XXIe siècle (An Everyday Colony of the 21st Century) is the title of a recently published work in French by Charles Durand. His book is written with the aim of awakening intellectuals and French politicians to the controlling influences language has on all our lives. It describes how decisions on the use of language have played a central role in the colonisation of the spirit of Europe – its intellectual and cultural values – by the intentional expansion of US influence. It explains how these values have been sacrificed on the altar of globalisation.

Making use of a great many sources, Durand demonstrates how the questions relating to language and its usage are of crucial importance. In a similar manner to the famous work *J'accuse...* by Emile Zola, Durand's book ought to provoke considerable disquiet about the current politics of language, more particularly the future of the French language – but also that of others.

From the cover page:

"Since 1945 the US empire has been continually growing and strengthening its influence. Its principal pillars are the English language and the dollar. As in all imperial structures, the expansion ... is revealed in its satellite states by the emergence of impoverishing conformism, by an infantile attitude, by policing of thought, then self-censorship and a noticeable weakening of creative power.

"... in Europe it is based on 'colonisation of the inhabitants' minds', i.e. real occupation of the spirit. This in turn gives rise to profound modification in patterns of thought and behaviour."

Durand demonstrates these phenomena, analyses them and shows how they relate to the expansion of English, ... whose official systems aim to stuff foreigners' heads ... also with the 'cultural' and ideological products it carries with it.

The work is enlightening on subjects people are not supposed to be interested in and reveals the transformation that has taken place ...

Durand's work is published in Belgium by EME (www.eme-editions.be/product.php?id_product=45803), in their collection Société, with the ISBN 978-2-87525-048-3. It costs €23. □



• ***Profesia usona filmo Utopia in Four Movements pri Esperanto kaj idealismo***

(vidu paĝon 9)

Serioza aliro

La ĵus-eldonita franclingva Lverko de Charles Durand, *Une colonie ordinaire du XXIe siècle*, ekprezentita sur paĝo 1, gravas ne malplej pro tio, ke aperas malmultege da seriozaj libroj en naciaj lingvoj, kiuj traktas la gravajn problemojn kaj iliajn solvojn, pri kiuj okupiĝas nia movado. Eĉ en multaj eŭropaj lingvoj ankoraŭ nenio ekzistas pri ĉi tiaj aferoj, des malpli pri Esperanto mem.

Oni facile imagas, ke pluraj kritikus kontraŭ Durand pro lia aliro al la problemaro. Aliflanke ŝajnas prava la aserto, ke tia aliro havas sian kuntekston kaj legontaron – ‘ĉevaloj laŭ kurejoj’.

Kaj, se ŝanĝi la temon al la ĵusa Brita Kongreso, kiu ĉefrolas en ĉi tiu numero, estas interese noti la sukcesan akiron, fare de Brian Barker, de bondeziroj por la kongreso de Ŝia Reĝina Moŝto, angle kaj kimre. Kvankam tio neniel indikas ian ajn subtenon, mi memoras netajn rifuzojn al tiaj petoj pri pli fruaj aranĝoj.

Geoffrey Sutton

- Material for the next issue of *EAB Update* should be with the editor no later than 27 August.
- Materialo por la venonta numero de *EAB-Ĝisdate* atingi la redaktoron plej laste la 27an de aŭgusto.



Scenoj el la Brita Kongreso: supre staras, de maldekstre, Hilary Chapman, la Urbeŝtrino de Llandudno; 'Alico el Mirlando' kaj prof. John Wells. Dekstre funkcias la dumkongresa libroŝerbo, kie sindone deĵoras Joyce Bunting, kaj sube oni vicstaradas por voĉdoni en la komitata elekto.



EAB-Update / Ĝisdate is a quarterly organ of the **Esperanto Association of Britain** / estas kvaronjara organo de **Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House / Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.**

Tel. 0845 230 1887 or +44 (0)1782 372141

Fax / fakse: on request / laŭpete

E-mail / rete: eab@esperanto-gb.org

Websites / ttt-paĝaroj: www.esperanto-gb.org
www.esperantoeducation.com

□ Membership of EAB costs £25 a year (£20 concession); supporter or youth member £10 / Membrigi en EAB kostas £25 pundojn jare (£20 rabatite); subtenanto aŭ juna membro pagas £10 pundojn.

☆

□ Material for *Update* should be sent by e-mail, computer disk (rtf format, please) or hard copy direct to the editor / **Materialon por Ĝisdate** oni sendu rete (formaton rtf, mi petas), diske aŭ papere rekte al la redaktoro: Geoffrey Sutton, 7 Clover Road, Aylsham, Norwich NR11 6JW; e-mail / rete: gsutton@computekmail.co.uk. Material may be in Esperanto, English, Welsh or Gaelic / Materialo rajtas esti en la lingvoj internacia, angla, kimra aŭ gaela.

□ EAB also publishes the review *La Brita Esperantisto*, wholly in Esperanto / EAB eldonas ankaŭ la revuon *La Brita Esperantisto*, tute en Esperanto.

☆

□ EAB is a registered charity (No. 272676) and an affiliated national association of the **Universal Esperanto Association**, which has official relations with the United Nations and Unesco / EAB estas leĝe registrita bonfara asocio kaj aliĝinta landa asocio de **Universala Esperanto-Asocio (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando. Tel. 00 31 10 436 1044; fax / fakse: 00 31 436 1751; e-mail / rete: uea@uea.org; www.uea.org)**, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesco.

☆

□ EAB is also affiliated to the International League of Esperanto Teachers and the European Esperanto Union / EAB aliĝis ankaŭ al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

☆

□ The views expressed in *EAB Update* are not necessarily those of the Management Committee of EAB / La opinioj esprimitaj en *EAB-Ĝisdate* ne repre estas tiuj de la Administra Komitato de EAB.

Ni spertis sukcesan jarkongreson en sunbrila Llandudno

Jen persona raporto pri la ĵusa Brita Kongreso de Esperanto en Norda Kimrio, verkita de juna membro de JEB, kiu eklernis Esperanton antaŭ nur unu jaro. Kaj li kaj ni rajtas fieri pro tio, kiel ankaŭ pri la bone organizita kongreso, kiun ni ĝuis en bela vetero.



La ĉemara promenejo de Llandudno, rigardante okcidenten

Post taŭge verda, sed longa vojaĝo tra meza Kimrio, mi kaj mia amiko, Frank, atingis Llandudnon. Troviĝis belega marborda urbo, feliĉe libera de tipa kimra vetero. La haveno estas flankata de du montetoj, kiuj nomiĝas 'Great Orme' kaj 'Little Orme'. Penda fervojo iras super Great Orme, kaj Manks-insulo videblas de la marbordo. Sume, la urbo ja estis belega, kaj kiel ni estis trovontaj, proponis ion por ĉiu ĉeestanto.

Uzi Esperanton en 'reala' vivo
Por kelkaj la kongresa hotelo iometete tro multekostis, sed alia kialo, kial Llandudno estis bona elekto por la kongreso, estas ke ĝi plenas je malmultekostaj gast-ejoj. En unu el tiuj mi mendis du-noktan gastigadon. Nia gastejo estis ĉarma, funkciigata de familio, kaj la elekto de multaj aliaj junaj kongresanoj. Po dek ok pundoj por nokto, oni

ne rajtas atendi pli ol puran, komfortan ĉambron kun matenmanĝo.

La kongresejo, la Hotelo Imperial, estis granda konstruaĵo, iom pli impona ol la aliaj sur la strato. Kiam oni eniris la hotelon, ne tuj evidentis, kie la kongreso okazas, pro la grandeco de la ejo. Finfine ni rimarkis televidilon, kiu montris Esperantlingvajn informojn pri – kaj direktoj al – la kongreso. Mi akiris mian



Plej supre: John Wells bonvenigas la Urbestrinon de Llandudno ĉe la Formala Malfermo. Akompanis ŝin lernejanino, kiu vestas sin kiel Alico en Mirlando laŭ urba tradicio pro la ligo kun la rakontoj.
Dua de supre: Komitato de EAB.
Tria de supre: Geoffrey Greatrex prezentas la laboron de la usona fonduso Esperantic Studies Foundation.
Plej sube: Dum la Jarkunveno.

nomŝildon kaj informojn pri la kongreso rapide kaj senprobleme (tiel bone organizite kiel la tuta kongreso). La akceptejoj funkciis ankaŭ kiel kaj librobudo kaj kafejo, kaj kondukis en grandan prelegon ĉambron, kiu estis la ĉefa kongresa ĉambro.

La Kongreso de Llandudno donis ankaŭ eblecon por mi kaj esperantistaj geamikoj nokte eliri, esplori, kaj kune uzi Esperanton en 'reala' vivo. Se mi estus restinta ĝis lundo, mi estus povinta eĉ grimpi la monton Snowdon/Yr Wyddfa!

Diversaj, interesaj kaj amuzaj spertoj

La aranĝoj inkluzivis programerojn en kaj pri Esperanto. Krome, estis tiuj, kiuj kondukigis en la angla, kaj/aŭ temis pri diversaj aferoj. Mi ĉeestis eble nur duonon de la programeroj, sed ĝuis diversajn, interesajn kaj amuzajn spertojn dum la semajnfino.

Por mense esperantigi min, mi partoprenis en 'Promenado por gelernantoj', gvidata de Harry Barron. Bonsorte, eblis diskuti la bluan ĉielon kaj la

brilantan sunon, anstataŭ pluvo (kiun mi duone atendis). Kvankam mi taksas min esti ete pli progresinta ol komencanta, la promenado certe estis kaj utila kaj informa. Kiam ni gelernantoj atingis la marponton, alvenis la tempo por reveni, aŭskulti la prelegon 'Kimrio bonvenigas vin' de Harry Barron. Eĉ kiel kimro, mi multe lernis kaj ĝuis la informan kaj interesan prelegon. Plej interesis min, ke la moderna revivigo de *eisteddfod*-oj (Kimraj kulturaj festoj) okazis en Londono! Oni facile povus imagi, ke multaj gekimroj ne tute fieras pri tio!

Poste, mi partoprenis en la dua diskutrodo, kiu temis pri fumado. Ĝin gvidis Tim Owen, Prezidanto de JEB. Mi interesiĝas pri la temo, kaj ĝojis havi eblecon doni mian vidpunkton, kiel kantisto. Surprize al mi, vere ĝi estis du-flanka diskuto. Evidente, fumado ankoraŭ havas bonan korpostaton!

Esperantujo plivastiĝis por mi Sabate, maltrafinte la Formalan Malfermon – mia sola plendo pri la kongreso estas, ke aferoj komenciĝis tro frue por semajnfino! – mi ekkongresis por aŭdi la prelegon de Anna Löwenstein. Ĉiutage dum la kongreso, Esperantujo plivastiĝis por mi. La Romio de Nerono, la fono de ŝia romano *La ŝtona urbo*, estis la temo, kaj maleblas ne interesiĝi pri ĝi. Mi retenas intereson pri estinteco ekde miaj studadoj, kaj mi ĝuis samtempe lerni pri kaj Romio kaj Esperanto.

Restante en la prelegejo, mi ĉeestis la prelegon de Brian Barker pri kiel efike intervjuigi. Lian temon mi ofte rekte renkontis dum la pasintaj kvin jaroj kiel profesia muzikisto. Pro tio, mi entuziasme antaŭĝojis aŭdi la opiniojn de aliuloj pri intervjuoj. Laŭdire, tiel, kiel oni devus konduki baze samas, ĉu oni estas politikisto, muzikisto aŭ esperantisto. Malgraŭ tio,

La venonta Brita Kongreso de Esperanto okazos en Eastbourne, 8–10 aprilo 2011

La kongreso okazos en eleganta kolegio 'Eastbourne College' kun granda razeno, en Old Wish Road. Ĝi tre proksimas al la marbordo, hoteloj, restoracioj, artgalerio kaj stacidomo.

Vi povos viziti la faman kaj belegan klif-supron 'Beachy Head' kaj spekti la klifojn desube per ŝipeto. Tiel vi eniros la etoson de la kongrestemo: "Lumturoj, lumuloj kaj lumaĵoj".

Post vizito al la urbo kaj klifoj, ni festos la interkonan vesperon en la impona urbodomo.

Ni ankaŭ luos la kolegian naĝejon por unu sesio! Ni havas tre favorajn prezojn – ili inkluzivas bufedon vendrede kaj tagmanĝojn sabate kaj dimanĉe. Por plenaj membroj de EAB, pagante ĝis la fino de februaro, la kosto estas nur £45. *Kia bona aĉeto!* Vidu la apartan aliĝilon en ĉi tiu numero, aŭ aliĝu per la retejo de EAB.

The membership's votes were as follows:

	For	Against	Abstentions
Joyce Bunting	66	4	1
Ian Fantom	5	45	21
Geoffrey Greatrex	59	3	9
Edmund Grimley Evans	57	6	8
Clare Hunter	64	1	6
David Kelso	63	3	5
John Wells	67	2	2
<i>For president:</i>			
Ian Fantom	5		
John Wells	66		

The following were elected to the Management Committee:
J. Bunting, G. Greatrex, E. Grimley Evans, C. Hunter, D. Kelso and J. Wells (president).

politikisto devus ne kondukti kiel The Sex Pistols dum intervjuoj! Mi atendis, ke mi estus povinta doni konsilojn pri la temo, sed ĉio, kion mi volis menciis estis menciita. Tiu prelego aparte multe valoris, laŭ mia opinio. Kvankam ne malfacilas bone prezenti sin kiel esperantisto (aŭ politikisto, aŭ muzikisto), facilas malbone fari tion. Laŭ mia sperto, ĵurnalistoj volas verki interesajn artikolojn, pli ol verajn!

Poste okazis kafpaŭzo. Dum ĉiu tago estis tiaj paŭzoj, por malstreĉiĝi, serĉi tra la librobudo kaj kunparoli kun aliaj. Poste, mi partoprenis en Komencanta Grupo, kiun gvidis Tim Owen. Mi eklernis antaŭ nur iomete pli ol unu jaro, kaj devas ofte recertiĝi min pri la fundamentoj. Junaj kaj malpli junaj esperantistoj havis eblecon lerni kaj demandi pri la lingvo en la pli malgranda, dua kongresa ĉambro. Mi plejparte sola lernis, kaj tial mi ĝojas, ke la kongreso donis al komencantoj medion por gvidate plibonigi sian Esperanton.

Prezentintoj meritas laŭdon

Kiam mi provas traduki kantojn en Esperanton, mi ofte renkontas malfacilojn. Antaŭ la distra vespero, mi eksentis min dubema, ke Esperanto tre taŭgas por muziki. Tamen, ŝanĝis mian opinion la lertaj muzikaj prezentantoj. Mi plej ĝuis la kantojn de Gijom. Li sin



akompanis, ludante elektran pianon (post 'teknikaj malfacilaĵoj'), kantante pri ulino kiu perdis siajn belajn buklojn. Ĝi estis tre bonhumura kaj esprimema prezentado. Laŭ mia scio, li

Plej supre: Harry Barron donas unuan lecionon de la kimra lingvo. Supre: Kantis por ni la elstara kimra virvoĉa ĥoro Cŉr Meibion Maelgun, kiu gajnis la Unuan Premion en la pasintjara Kimria Nacia Kulturfesto aŭ Eisteddfod.

Daŭrigo sur paĝo 7



La marponto de Llandudno

Inspira diservo ĉe la Brita Kongreso

La diservo ĉi-jare okazis dimanĉon, la 16an de majo en la metodista preĝejo de Sankta Johano. Ĝi estas oportune lokita en la ĉefstrato Mostyn Street kaj estas granda majesta konstruaĵo de la 19a jarcento.

Martyn McClelland bone organizis la aferon kaj prezidis en sia kutima efika maniero tiel ke ĉio iris glate. Ni estis bonŝancaj havi la helpon kaj konsilon de Richard Hall el la Metodista preĝejo en Wrexham (Wrecsam), kiu aranĝis kaj la lokon kaj la orgeniston. Krome li, malgraŭ tio ke li estas progresanto en la lingvo, faris trafan prelegeton laŭ la temo de Pentekosto.

La diservo daŭris de 09h15 ĝis 09h50, ĉar la jar-kunveno de EAB komenciĝis je la 10h00. La unua legaĵo estis Genezo 11:1–9, kiun legis Geoffrey Wood, kaj la dua estis Marko 16:14–20, legata de Heather Eason – ambaŭ taŭgaj por nia afero.

Ni kantis kvar himnojn, ĉiuj laŭ bone konataj kimraj melodioj: 'Blaenwern' ('Amo Dia, tutsupera'), 'Rhyddlan' ('Eternulo, granda Dio'), la fama 'Ar hyd y nos'/'All through the night' ('Pro la amo de l' Sinjoro'). Ni finis per tiu bone konata kaj animlevanta himno 'Gvidu antaŭ mi, Jehovo' ('Cwm Rhondda').

Kvankam estis alternativa programo en la kongresejo samtempe, dudek homoj plus unu infaneto ĉeestis kaj kontribuis al monkollekto, kiu sumiĝis je £90. Ĝin oni sendas – laŭtradicie – al bonfara fondaĵo, kiu helpas blindulojn en finance malavantaĝaj landoj.

Entute sukcesa kaj inspira diservo.

Geoffrey Wood

BRITA KONGRESO DE ESPERANTO



Supre: Anna Löwenstein prezentas. Ŝi dufoje prelegis: sub la titolo 'De Keltujo al Romo' pri la fono de sia historia romano La ŝtona urbo, kaj pri Nerono, lige kun sia romano Morto de artisto, sub la titolo 'La imperiestro, kiu naskiĝis en Zamenhof-tago'.



Supre: Prelegas Hju Rid pri "Strategio de l' instinktoj", kiu temis pri ebla ekonomia-komerca strategio por disvastigi Esperanton.

Sube: John Wells prezentas sian renovigitan dudirektan vortaron, ĵus eldonitan de Mondial. La libro estis furoraĵo ĉe la kongresa libroservo.



mem verkis la kantojn. John Wells eksponis al ĉiuj kiel funkcias akordiono, kaj ludis viglajn melodiojn kimrajn. Mi iomete hontas, ke mi ne aktive partoprenis! Estis nur pro manko de gitaro. Menciindas, ke ĉiuj prezentintoj meritas apartan laŭdon. Laŭ mia sperto, estas malpli timige prezenti koncerton antaŭ du mil homoj ĉe festivalo, ol antaŭ okdeko da aŭskultantoj en prelegĉambro. Du mil homoj estas kiel unu grupo, sed malgranda spektantaro estas multaj individuoj, kiuj ĉiuj rigardadas vin! La prezentintoj tre kuraĝis.

“Mi nepre ĉeestos la venontan kongreson”

Ĉeestinte kaj la JEBan Jar-kunsidon kaj tiun de EAB, mi multe gajnis valoran komprenon pri kiel funkcias la movado. Mi ne sentis min rajtigita komenti



Plej supre: La Urbeŝtrino de Llandudno bonvenigis nin.

Sub tio: La ĉemara promenejo, rigardante orienten.

Maldekstre supre: Sally Philips gitarludas dum la Distra Vespero.

Supre: Prelegas Olga Kerziouk pri la restado de la ukraina Esperanto-verkisto Vasilij Eroŝenko (1890–1952) en Anglio en 1912.

Maldekstre: Dumpaŭza babilado.

dum la EAB-Jarkunsido, ĉar mi ne aniĝis en EAB. Tamen, kiel aktiva JEBano, mi ĝuis kontribui al diskutoj dum la Jarkunsido de JEB. Dum ambaŭ, elektoj okazis, kaj ili evidente al mi estas pli ol nuraj kutimoj.


La fortajn penojn de la organizintoj oni devas ne forgesi. Pro ili glate, senprobleme kaj ĝue pasis la tuta semajnfino, kaj mi dankas ilin. Mi nepre ĉeestos la venontan kongreson!

Rob Hawkins

Tuj sube: *La LKK de Llandudno simbole transdonas la flagon al la LKK por la venontjara BK en Eastbourne (dum obstrukcas la vidon fotanto de rivala gazeto).*

Meze: *Brian Barker ŝajnterjvas dum sia anglalingva prelego pri kiel fronti la interjuiston.*

Plej sube: *Angela Tellier prezentas la plej lastajn novaĵojn pri la projekto por elementaj lernejoj Lingvolanĉilo.*



Pli da informoj pri la Brita Kongreso

Ĉeestis 79 homoj, kio estis pli alta nombro ol en la pasintaj kvar-kvin jaroj. Ili plejparte estis britoj, sed partoprenantoj venis el Belgio, Danio kaj eĉ kvar el Francio. Alvenis alilandanoj laborantaj aŭ studentaj enlande, do entute partoprenis homoj el dek landoj.

La librobudo vendis je ĉirkaŭ £1 060 pundoj, grandparte pro la furoro de la nova vortaro de John Wells kaj unu-du aliaj multekostaĵoj.

Eĉ BBC rakontis pri la BK

La kongreso, eĉ se ne granda, altiris la atenton de kelkaj radio-programoj, ne nur kimraj. Eĉ angla retpaĝo de BBC rakontis pri la aranĝo.

Kanti ĝis la 3a horo matene

Kuraĝige estis vidi novulojn kaj junajn kaj ne tiel junajn. La membroj de Junularo Esperantista Brita (JEB) tre aktivis, ne nur en la kongresejo, ekzemple kante ante ĝis la 3a horo matene!

'Drondoj' ekparoligis

Oni okazigis plurajn 'drondojn' pri aktualaj sociaj temoj. Ili montriĝas esti aparte popularaj. Kongresanoj, kiuj hezitus leviĝi en plena kongresa salono por starigi demandon, ne hezitis partopreni vikle en tiuj rondetoj.

Distraj talentoj

Dum la distra vespero elstaris la bonvenaj talentoj de du francoj, Gijom Armide kaj Francis Soghomonian, kiuj kantis per tre malsimilaj stiloj.

Montara ekskurso

London dek naŭ kongresanoj ekskursis aŭtobuse al la kimra montaro Snowdonia/Eryri.

Observantoj kondamnas la anglemon de la Komisiono de EU

Malgraŭ la strebado de EU por starigi multlingvan skipon por sia porparola servo, observantoj kondamnas la danĝeran tendencon, sine de la eŭropaj institucioj, al lingva kaj kultura hegemonio fare de la angla lingvo.

Laŭ interna dokumento, kiun konsultis Euractiv.com, montriĝas, ke 11 el 26 proparolantoj destinitaj por la venonta Eŭropa Komisiono estas angla-lingvanoj, inter ili 7 britoj kaj 4 irlandanoj.

Funkciulo de la hispana prezidanteco de EU substrekiis, ke gravas pluteni proporcion de ĉiu nacio en la publikaj servoj, inkluzive de la proparolantoj.

Minaco al kultura plurismo

Laŭ Lorenzo Consoli, prezidanto de Internacia Asocio de la Gazetaro (Association Internationale de la Presse – AIP), depost la plivastiĝo de EU, ekde 2004, estas forta tendenco privilegii, en la gazetara salono, funkciulojn, kies denaska lingvo estas la angla. En tio estas risko privilegii la kriterion de lingvo en la elekto de proparolanto, prefere al kvalifiko kaj kompetento en komunikado. Li aldonis, ke “la superrego de la angla povas havi kulturajn kaj politikajn efikojn” kaj ke lingva plurismo endanĝerigis, se la tendenco ne inversiĝus.

Neŭnion pri aliaj lingvoj de EU

Laŭ li, “la politiko pri komunikado de la Eŭropa Komisiono

Profesia usona filmo pri Esperanto kaj idealismo

montrita jam en Sundance kaj San-Francisko – kaj en oktobro en Novjorko

Kelkmil homoj, multaj kspertuloj pri filmoj, jam vidis la novan profesian filmon pri Esperanto kaj idealismo pli generale – kaj pliaj miloj legis pri ĝi. Kelkminuta eltiraĵo videblis, kaj eventuale ankoraŭ videblas ĉe <http://vimeo.com/10903101>.

La reĝisoro, Sam Green (http://en.wikipedia.org/wiki/Sam_Green), estas alte premiita dokumentisto. Li produktis la filmon *Utopia in Four Movements* helpe de pluraj subvencioj, i.a. kun subteno kaj kontakto kun prof. Humphrey Tonkin kaj Esperantic Studies Foundation <www.esperantic.org>.

Post la famaj kaj jamaj film-festivaloj en Sundance kaj San-Francisko, Sam Green esperas, ke miloj da novjorkanoj venos vidi la filmon. Neformala kontrakto estis konsentita por The Kitchen, spektaklejo en tiu urbego, por oktobro 2010.

Ankaŭ francoj faras filmon

Flanke notindas, ke en Francio – dank’ al klopodoj kaj financa partopreno de SAT-Amikaro – ankaŭ la konata reĝisoro kaj dokumentfilmisto Jean-

Dominique Gauthier (http://fr.wikipedia.org/wiki/Jean-Dominique_Gautier) preparas dokumentan filmon pri Esperanto, ankoraŭ titolotan, kiu principe aperos en marto 2011.

Pri tio oni komentis: “Unu kvaronhoru sufiĉas por spekti la filmeton de Sam Green; ĝi multe plaĉis al mi.

“Kiel la infaneto en la filmo, mi povus diri ‘tiu mondo timigas min, sed kiom da potencoj ĝi kunportas!’.

“Valoras, ke multaj prenu tempon por spekti ĝin ankoraŭ por kuraĝigi al Jean-Dominique Gauthier.”

La franca filmo estos dublite spektebla en la ses laborlingvoj de UN – la angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa – kaj en Esperanto. Laŭdire, aldono de subtekstoj en pliaj lingvoj estos ebla, se venos helppropoj.

La DVD estas jam antaŭmendebla kontraŭ €18 por individuoj, €40 por grupoj aŭ bibliotekoj, kiuj aĉetas plie la rajton senpage projekcii aŭ pruntedoni.

Ĝeneralaj informoj en <<http://esperantofilm.com/>>. □

estus mem en danĝero, se ĝin plenumus ekskluzive funkciuloj, kies denaska lingvo estas la angla”. Li asertis, ke ili emas uzi esprimojn, kiuj fontas el la angla literaturo aŭ kulturo, kiujn povas ne kompreni plimulto el la nebritaj ĵurnalistoj. (...) “Paradokse, la anglalingvaj proparolantoj riskas komuniki malpli bone en la angla ol iliaj alinaciaj kolegoj.”

Por garantii tiun plurismon, AIP favoras al proporcion distribuo de postenoj de proparolantoj kaj defendas la dulingvan reĝimon, akceptitan en la gazetara salono, kie la ĵurnalistoj povas demandi angle aŭ france. Oni nenion diras pri la aliaj lingvoj de Eŭropa Unio!

La tendenco tamen estas al reduktado de multlingvaj gazetaraj komunikoj. □

La kampanjo por Esperanto en brazilajn mezlernejojn

Post la amasa reago de esperantistoj kun subteno al la aprobo de la leĝoprojekto por instigi instruadon de Esperanto en brazilaj mezlernejoj, la federacia deputito sinjorino Andreia Zito (el la ŝtato Rio-de-Ĵanejro, partio PSDB) denove prezentis antaŭ nelonge sian favoran raporton.

Antaŭ pluraj semajnoj, ŝi reprenis sian raporton en la Komisiono pri Edukado kaj Kulturo de la Brazila Ĉambro de Deputitoj. Aldoniĝis tri alineoj, kies esenco estas:

“Nepras reliefigi, ke Esperanto ne celas anstataŭi naciajn lingvojn, sed roli kiel dua, por pritraktado de mondaj problemoj kaj interpersonaj rilatoj. Ĝi ne havas kulturimperismajn celojn kaj agas favore al la konservado de la kulturo kaj la suvereneco de la popoloj.

Nepras reliefigi, ke Esperanto ne estas ligita al kiu ajn religio. Ĝi estas nur lingvo kaj tial ĉiuj rajtas ĝin uzi laŭplaĉe, por kiu ajn celo.

Pri la jam pruvitaj avantaĝoj de la uzo de Esperanto, ni povas aserti, ke pro tio, ke ĝi ne estas ligita al specifa lando, ĝi ne donas privilegiojn, kaj oni povas ĝin lerni pli rapide dank’ al la simpleco de la prononco, al ĝia internacia vortaro, al ĝia prefiksa/sufiksa sistemo, ĝia vasta literaturo de tradukitaj kaj originalaj verkoj, kaj ĝi faciligas la kulturan kaj intelektan intersanĝon inter la popoloj.”

Tiu dokumento ekigis la voĉdonadon de la leĝoprojekto, en unu el la venontaj sesioj de tiu parlamenta temkomisiono.

Salutu kaj danku s-inon Zito

Se vi ankoraŭ ne salutis ŝin, jen la reta kaj ‘fizika’ adresoj: dep. andreiazito@camara.gov.br aŭ:

Deputada Andreia Zito, Praça dos Três Poderes – Câmara dos Deputados, Gabinete: 636 – Anexo: IV, BR-70160-900 Brasília, DF, Brazilo.

La prezidanto de tiu Komisiono, respondeca do pri la tagordoj, estas Deputito Angelo Vanhoni (el la ŝtato Parana, partio PT): dep.angelovanhoni@camara.gov.br.

La brazila Senato jam antaŭe aprobis tiun projekton, sed teknika termino, kiun la raport-

inta deputitino proponas modifi en la redakto, eble kaŭzos ĝian resendon al la Senato, por ratifo. Post tio, la leĝo pluirus por fina sankciigo fare de la respublika prezidanto (nuntempe Luís Inacio Lula da Silva, kiu lastjare komisiis oficiston sendi subtenan respondon al letero pri Esperanto de la Prezidanto de UEA).

(Informis James Rezende Piton, UEA-Ĉefdelegito por Brazilo.)

Grava mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de UEA

Estimataj,

La situacio de la membrostatistiko fine de marto postulas energie plivigli la varbadon por eviti malkreskon de la fina membronombro ĉi-jare.

Fine de marto estis 4 463 membroj, t.e. 232 malpli ol fine de marto pasintjare. La ĉefa kialo evidente estas, ke pro la malpli granda UK ĉi-jare estas malpli da tiuj, kiuj membrigas por profiti de malpli alta kongreskotizo.

Inter la nunaj membroj 405 ne membris pasintjare. El ili 113 aliĝis al la UK en Havano. Samtempe 1 650 pasintjaraj membroj ankoraŭ ne renovigis la membrecon. El ili 546 estis aliĝintaj al UK 2009.

La kongresa efiko ĉefe influas MJ-membrojn [t.e. Membro kun Jarlibro]. Fine de marto ilia nombro estis 958, antaŭ unu jaro 1 086. Junaj MJ estas 118, pasintjare 133. Ambaŭ kategorioj sume estis je 143 sub la nombro antaŭ unu jaro.

Membroj-Abonantoj nombris fine de marto 2 091, junaj MA 88. Antaŭ unu jaro estis 2 193 MA kaj 92 junaj MA. Sume falo de 106.

Membroj kun Gvidlibro kreskis de 218 pasintjare al 251 nun. Tion parte klarigas la apero de la reta bulteno por la MG-membroj. 41 el MG estas tute novaj membroj, 38 estis MJ kaj 20 MA pasintjare.

Okdek kvar pasintjaraj MA remembrigis kiel MJ. Parto el ili elektis la kategorion MJ, ĉar nun ankaŭ MJ rajtas legi la revuon *Esperanto* rete. Tio tamen ne estis la kaŭzo en ĉiuj kazoj, ĉar ĉiam parto de MA-membroj ŝanĝas al MJ pro diversaj kialoj. Aliflanke 92 MJ-membroj estas novaj (ne kalkulante la aliĝintojn al UK), sed ne eblas diri, kiuj el ili membrigis pro la reta legebleco de la revuo kaj kiuj sendepende de tio. La nombroj tamen indikas, ke la plivastigo de la retaj servoj apenaŭ influas la statistikon – notindas ankaŭ, ke 42 pasintjaraj MJ kaj 11 pasintjaraj MG pagis ĉi-jare MA-kotizon kaj ke 106 MA ne estis membroj en 2009.

Konklude: necesas ekstra aktiveco por varbi membrojn, ĉar alie la nombro de individuaj membroj estos ĉi-jare 5 400–5 500. Aparte urĝas donacoj al Fondaĵo Canuto [kiu donas senpagan anecon al esperantistoj en nepagipovaj situacioj], kiu laŭ la ĝisnuna evoluo eble povos ĉi-jare membrigi ĉ. 100 esperantistojn malpli ol pasintjare, kio aldone premus malsupren la membronombro.

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de Universala Esperanto-Asocio

Popular Barlaston weekend courses

Are you new to Esperanto? Then 'Course-you-can' is for you!

Come along to Barlaston for an enjoyable weekend in October (22nd–24th) when you will be encouraged to learn and practise the basics of Esperanto.

The course is intended for beginners and near-beginners, so that all are at a similar level (sharing the same mistakes!). The four skills of listening, reading, speaking and writing will all be developed in a relaxed atmosphere, and students will discover more about the culture of Esperanto and its actual use around the world.

An ideal opportunity

Whether you are a complete beginner or already have some knowledge of the language but haven't yet been able to put it into practice, this is an ideal opportunity: not only will you have a specially tailored course, but you will also be able to meet experienced Esperanto-speakers from the parallel 'Drondo' (discussion group) course. The aim is to use Esperanto as much as possible – in the dining-room as well as the classroom – and being 'surrounded' by it is definitely helpful; but don't be put off – beginners are allowed to use English when necessary!

Free time can be spent – weather permitting – strolling round the college garden, in the countryside or by the canal; there will also be opportunity to visit the Butler Library and the Esperanto bookshop in Esperanto House, EAB's HQ – browsing is encouraged before buying the essential aids. Strangely, the village pub seems to exert some attraction during the evenings, and conversation really flows!

Subsidy for FPC finishers

As a further incentive – if one were needed – students who complete the 12-lesson Free Postal Course this year and wish to attend will be entitled to a subsidy being offered by the Esperanto-Asocio de Britio. Full details and application forms are

available from EAB office.

I look forward to meeting you in October. Ĝis tiam!

Malcolm Jones,
course tutor

Postskribo por spertuloj: bonvolu kuraĝigi viajn amikojn / kolegojn / najbarojn ekprovi nian kurson!

Furoras la diskutronda formato

Partoprenu en la sesa 'Drondo'!

Okazos la 6a Drondo-semajnfino en Barlastono en oktobro. Se vi estas ofta leganto de *EAB-Ĝisdate*, vi sendube jam scias, kio estas 'Drondo', do vi pretersaltu tiujn priskribajn vortojn. 'Drondo' estas kunmetaĵo de la vortoj *diskuta* kaj *rondo*, kaj la koncepton lanĉis Derek Tatton antaŭ du jaroj. Drondanoj sidas en grupo kaj, sub gvidado de la drondestro, pridiskutas preparitajn temojn. La elstaranta punkto estas, ke la diskutado okazas nur en Esperanto.

Pasintaj drondanoj diskutis revoluciojn en Ĉinujo, preparolis siajn opiniojn por sep nuntempaj mirindaĵoj, lernis pri la aventuroj de Mona Lisa, kaj disputis pri reagoj al la tiam novaperinta financa krizo.

Dum la semajnfino de la 22a ĝis la 24a de oktobro okazos la venonta Drondo, la 6a en la serio. Laŭintence la temoj estos 'Personaj herooj', 'Dorlotbestoj', 'John Ruskin' aŭ 'Thomas Aquinas', kaj 'Klimatoŝangiĝo'.

Fakte, ĉu mi metu la temon 'klimatŝanĝo' en tiu lasta loko? Ĝuste tiajn demandojn ni pridiskutos.

Sekve de la okazigo de pluraj sukcesplenaj Drondoj ĉe la pasinta Brita Kongreso en Llandudno, ni esperas vidi pli da novaj vizaĝoj en Barlastono.

Mi substrekas, ke la Drondejo estas bela, kiel ankaŭ estas la ebleco povi paroli en flua Esperanto pri personaj kaj nuntempaj interesajoj. Kontraŭ la aliĝmona oni ricevas ne nur la dormolokon, sed ankaŭ po ses manĝopladoj, plurajn te- kaj kafaŭzojn (kun dolĉaĵoj), kaj la okazon viziti la bibliotekon kaj oficejon, kie aĉeteblas libroj. Kaj ni ne forgesu, ke kutime okazas eta ekskurso al lokaj trinkejoj por fini la tagon per agrabla konversacio kun amikoj en ripoza, refreŝiga medio.

Por pli da detaloj, kontaktu kun Viv en la oficejo. Retadreso: eab@esperanto-gb.org; tel. 0845 230 1887.

Tim Owen

Kiu estis la unua denaska esperantisto?

Mi pensas, ke mi legis aŭ aŭdis supozon, ke unu el la gefiloj de Montagu Butler estas la unua denaska esperantisto. Tamen, mi ĵus legis jenon ĉe <http://promene.wordpress.com/2010/03/10/ino-kolbe/>:

“Hodiaŭ okazis la entombigo de Ino Kolbe. Ŝi mortis kun 95 jaroj la 16an de februaro 2010 en Leipzig. Laŭ mia scio ŝi estis la plej aĝa denaska esperantisto. Krom tiu senmerita kuriozaĵo mi opinias ŝin interesa persono, ĉar ŝi aktive partoprenis en la Esperanto-movado kaj laboris per vigla cerbo ĝis plenumiĝo de sia vivo.

“Ino naskiĝis la 28an de februaro 1914 kiel filino de Frida kaj Reinhold Voigt. La gepatroj estis fervoraj esperantistoj kaj parolis hejme nur Esperanton. La germanan lernis Ino kaj ŝia pli juna frato Holdo nur sur la strato, dum ludado kun aliaj infanoj. Unu el la frauj rememoroj de Ino temis pri sperto de lingva diferenco: “Foje mi revenis hejmen tute ekscitita, ĉar la aliaj asertis, ke mia turbo estas ‘Kreisel’.”

Laŭ <http://biblbut.wordpress.com/la-britaj-esperantistoj/montagu-butler-kaj-lia-biblioteko/la-familio-butler/> la unua gefilo de Montagu Butler, Myfanwy, naskiĝis en 1915.

Vikipedio mencias Emilia Gastón kiel denaskan esperantiston naskitan en 1904: http://eo.wikipedia.org/wiki/Denaskaj_Esperanto-parolantoj#Historio. Tamen, Vikipedio ankaŭ havis la filinojn Polgár kiel denaskajn esperantistojn. Ŝajne oni intertempe korektis tiun aserton.

Edmund Grimley Evans

Esperanto-dissendoj de Pola Radio denove sub atako

Karaj Geaŭskultantoj, Karaj Radio-amikoj,

Laŭ la decido de la superuloj de Pola Radio, Gabi Kosiarska ekde la plej proksima lundo [17a de majo] estas delegita kun grupo de kelkaj aliaj radiaj kolegoj al laboroj ligitaj kun ŝanĝo de la portalo de Pola Radio. Lige kun tiuj taskoj – por ankoraŭ ne precize difinita periodo – la laboro de la Esperanto-servo de PR estas frostigita. En nia paĝaro (ni supozas, ke lunde, merkrede kaj vendrede) aperados nur ripetaj programeroj. Oni flegas la esperon, ke post kelka periodo ĉiuj nun delegitaj personoj povos reveni al siaj kutimaj okupoj, do Gabi en la Esperanto-sekcio de Pola Radio.

Anticipe ni dankas pro ĉiuj korespondaj reagoj. Ĉiuj gravas en nia laboro por la formo kaj enhavo de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio. Ni dankas do pro tiuj, kiuj jam venis. Ni anticipe dankas pro laŭvicaj. Niaj adresoj estas senŝanĝaj: esperanto@polskieradio.pl kaj/aŭ barbarinella@gmail.com

Se vi volas rilatigi vin al la lastaj decidoj, direkti demandojn, ricevi respondojn de PR, skribu uzante en via korespondaĵo preferu nur vian nacian lingvon aŭ la anglan, eventuale la polan

Memorigo pri la skriba kaj fota konkurso

Jen eta memorigo pri nia skriba kaj fota konkurso (www.esperanto-gb.org/eab/eab_news/2009-09-31_competition), antaŭ ol vi ferios al – espereble – fotindaj kaj raportindaj aranĝoj. Ĝis nun, bedaŭrinde, ni ricevis magran kvanton da raportoj.

al la prezidanto de PR: Jarosław Hasinski, Prezes Zarządu PR S.A., Al. Niepodległości 77/85, PL-00-977 Warszawa; retadreso: Jaroslaw.Hasinski@polskieradio.pl; aŭ al: Paweł Majcher, Członek Zarządu – laŭ la sama koresponda adreso. Temas pri la Prezidanto de la Estraro de PR kaj pri membro de la estraro de PR.

Nia adreso por paperaj leteroj kaj sendaĵoj estas:

Esperanto-Redakcio de Pola Radio, al. Niepodległości 77/85, PL-00-977 Warszawa, Pollando.

Esperanto-Redakcio de Pola Radio

Ps. Ankaŭ eblas skribi al ambasado de Pollando (listo de ambasadoj: http://embassy-finder.com/fr/poland_ambassies.)



Our tradition

Dear Editor,

At the congress at Llandudno, I was pleased that the first stanza of ‘La Espero’ was sung at the AGM, and the Esperanto flag formally handed over. The organisers deserved our thanks for their hard work to make the event enjoyable.

Had the whole song been sung at the solemn opening, however, it would have been a good performance for the visiting lady mayor. It would not be difficult to set up a cassette player, if live music were not available.

After the solemn opening, I was able to hand the lady mayor a copy of our mini-course booklet, but it might have been even better for the EAB to give her a book, for example Richardson’s *Esperanto: Learning and Using the International Language*. If the Esperanto flag had been suitably displayed, it could also have stimulated interest.

I agree that no one should have to sing against their will, and would not criticize anyone

physically frail. The tune might not suit everyone's taste, but the value of a traditional tune is precisely that it does not change with fashion, and so connects us to the earlier movement. The ideals of the later stanzas are worth preserving, even if they are not yet realised. Therefore, those of us who wish to maintain the traditions should be able to do so, and I hope that this will be the case with 'La Espero' and the display of *la verda standardo* next year!

Miland Joshi



Konsilo kaj informteknika subteno petataj

Koran saluton!

Ĝoju pri pozitiva novaĵo. Ni petas praktikan konsilon kaj eble (informteknikan) subtenon.

A) En la kastela muzeo de Herzberg am Harz ni nun havas konstantan kaj publikan informlokon por informi pri Esperanto. La urbo disponigas taŭgan ejon, tamen ni devos tion plani, prepari, kaj konstante prizorgi.

La muzeo postulas altan aspektnivelon laŭ nuntempaj muzeaj normoj.

1) Grandaj avantaĝoj: – konstanta informejo en publika muzeo (dum la muzeaj malfermhoroj), por turistoj (dumsomere el nemalmultaj landoj), lernejoj, klasoj, informserĉantoj ktp.

– Esperanto povas prezenti sin (ankaŭ kun diversaj ekspozicioj kun fakaj, instruaj, historiaj, sciencaj enhavoj)

– ni povas varbi publike (rete, flugfolio, afiŝe ktp.)

– ni povas eniri en la normalajn kulturkanalojn (agentojn, gazeton, amaskomunikilojn, muzeogvidlibrojn ktp.)

– ni povas surloke foje proponi fakajn kaj sciencajn prelegojn, informhorojn, provinstruadon ks.

– ni povas partopreni ĉe

A date for your diary

Don't forget this year's jubilee **Summer School in Barlaston**

9–13 August – further details from Esperanto House, tel. 0845 230 1887, or the previous issue of *EAB Update*.



kulturfestoj en la kastelo.

2) Ni devos ellabori koncepton (enhavo, grafike, teknike).

Krome ni bezonas allogajn nuntempajn vitroŝrankojn, taŭgajn ekipaĵojn ktp.

Ni petas subtenon, ĉar tio estas en Germanio eksterordinara bonŝanco por konstante informi multkanale kaj publike pri Esperanto.

3) Pluaj aspektoj:

Tio povus esti la unua paŝo esti kaj resti en la muzeo. Ni proponas organizi en la sekva/j jaro/j konferencon, simpozion pri Esperanto-muzeoj, bibliotekoj, scienca agado.

B) Multlingva gvidsistemo en la muzeo:

Nun la urbo preparas elektronikan gvidsistemon almenaŭ en la germana kaj Esperanto.

C) En aŭtuno 2010 la urbo ricevos 4 ĝis 5 pluajn salonojn por specialaj ekspozicioj. Foje ni povos tie oferti apartajn ekspoziciojn rilate al Esperanto, komunikado ks.

Ĉ) Kiu povas helpi (honorofice) organizi kaj prepari materialojn por la konstanta muzea angulo kaj por laŭokaze ŝanĝendaj ekspozicioj?

Laŭeble aliaj kunhelpantoj asistu ankaŭ ĉe esploraj laboroj en la biblioteko, gazetarkivo, informado ktp.

Volonte ni aŭdos vian respondon, ĉar ni devos plani.

Petro Zilvar, Harald Mantz,
Zsafia Korody

<http://esperanto-urbo.de>
Interkultura Centro Herzberg,
DE-37412 Herzberg/Harz – la
Esperanto-urbo,
Grubenhagenstr. 6
Tel. +49/(0)5521-5983

Ĉina studentino al Warwick

Karaj amikoj el Britio,

Saluton! Mi estas ĉina esperantisto. Mi estas 48-jara viro, ŝtata oficisto, Estro de Scienco-Teknika Buroo de Jingchuan-gubernio en Ĉinio. Mia Esperanta nomo estas Trezoro. Mi planas viziti Brition en la venontaj unu-du jaroj. Ankaŭ mia 22-jara filino parolas Esperanton. Ŝi studos sociologion en Universitato de Warwick por magistriĝi ekde la 4a de oktobro 2010. Ŝi deziras aliĝi al lokaj aŭ junulara, faka Esperanta grupo en Britio. Ni esperas kontakti kun Esperantaj parolantoj en Britio interrete aŭ telefone.

Trezoro (Huang Yinbao), Ĉinio
skajpo: huangyinbao@163.com
rete: agrikulturo@163.com
Tel. 86+13993316800
<http://www.ipernity.com/home/huangyinbao>



Poŝtkartoj petataj por '3-stela Esperanto-grupo' de Francio

Saluton al vi ĉiuj!

St. Nazaire, nia urbo, ricevis 3-stelan diplomon dank' al la nombro de la esperantistoj en nia loka societo. Do, St. Nazaire estas 'Esperanta Urbo'!

Antaŭ kelkaj jaroj ni tradukis kelkajn informiletojn pri St. Nazaire, kaj la 4an de junio ni transdonos oficiale al la respondeculino de la turism-agentejo la informilojn en Esperanto, ... kaj la diplomon al nia urbestro.

Ni ŝatus ricevi poŝtkartojn por montri al nia urbestro, ke St.

Nazaire estas konata en la tuta mondo dank' al Esperanto. Ni atendas senpacience viajn vortetojn. Ni antaŭdankas vin ĉiujn.

Centre Culturel
St. Nazaire Esperanto,
chez Patrick et Chantal Barret,
38, rue de la Croix Fraiche,
FR-44600 Saint Nazaire, Francio



Helpo petata en Katmando

Karaj Gemikoj ,
Mia nomo estas Anilo el
Nepalo. Ĉu vi vizitis mian

landon? Se ne, bonvolu konatiĝi kun mia lando, ĉar ni havas Esperanto-Klubon de Katmando. Ni estas nova grupo de studentoj, do ni ne tute bone komprenas Esperanton. Ĉu vi havas tempon por helpi al ni?

Mi estas la prezidanto de la klubo kaj havas vojaĝoficejon en Katmando. Se vi havas tempon, bonvolu skribi al mi. Nia reta paĝo estas <www.tikatravel.com.np>.

Anilo Ratna,
Nepalo
www.ipernity.com/anilratna
www.facebook.com/anilratna

majo je 17h50 kun Hilary Chapman kaj Heather Eason. Ĝi daŭris kvar minutojn.

• **Elŝuti la originalan Esperantan krimfilmon *Angoroj***
Eblis, kaj eventuale ankoraŭ eblas, elŝuti la preskaŭ neaĉeteban filmon *Angoroj* el la retpaĝo <www.megaupload.com/?d=YZHZ0P6H>. Ĝi estas en la formato MP4 kaj ampleksas 340 megabajtojn. Tiu nigra-blanka krimfilmo, kiun reĝisoris Srdjan Flego, aperis en 1966. Ĝin enkondukas Gaston Waringhien, kaj en ĝi ludon rolas humoristo Raymond Schwartz.

Geoffrey King, Bibliotekisto de EAB, diras, ke se iu maltrafis ĝin, aŭ havas malrapidan retkonekton, li povas iel plusendi la dosieron, ekzemple surdiske. Biblioteko Butler jam havas la filmon vidkasede, sed ne estas ekipita por kopii ĝin.

• **Prunteprenebla ekspozicio ĉe nova germana Esperanto-biblioteko**

En Herzberg, Germanio, post multjara laboro, ekestis 'unika' Esperanto-biblioteko kun arkivejo en la Esperanto-Centro. Laŭdire ĝi nun jam apartenas al unu el la grandaj kaj ordigitaj Esperanto-kolektaĵoj de la mondo.

Al la biblioteko apartenas pli ol 7 000 diversaj libroj, pli ol 13 000 diversaj gazetoj, miloj da broŝuroj, pli ol 500 'sonportiloj', pli ol 250 filmoj (sur vidbendoj aŭ kiel lumdiskoj).

Ĝi akceptas, kolektas kaj konservas ankaŭ multajn aliajn Esperanto-rilatajn objektojn.

En la biblioteko de ICH estas aparta pedagogia-metodika fak-kolektaĵo kun didaktikaj materialoj, lern- kaj instruhelpiloj.

La biblioteko estas eĉ semajnfine atingebla, tamen antaŭanonco estas dezirinda. Multaj eroj estas pruntepreneblaj.

Preskaŭ ĉio estas listigita, serĉebla en elektronika katalogo. Interŝanĝo jam funkcias kun

• **BBC Persian Service informs about Esperanto**

Brian Barker did a ten-minute radio interview with the BBC Persian Service about Esperanto on 13 April in connection with the Nobel Peace Prize nomination of UEA. It was also mentioned on the Persian-language website of the BBC: www.bbc.co.uk/persian/arts/2010/04/100419_125_esperanto_nobel_prize.s. See also the Esperanto Lobby website: <http://esperantolobby.wordpress.com/2009/12/29/nobel-peace-prize-for-esperanto-2/>.

The Persian-language article is long, well-documented and full of information (on Zamenhof, language rights, persecution under the Nazis and USSR, on UEA, the Esperanto flag, as well as Brian Barker's opinions, etc.).

The authoress, who seems to be Maryam Rastegar, is to be congratulated, as is Brian.

• **Radio interviews**

Derek Tatton was interviewed by Radio Stoke-on-Trent on the morning of 14 May as part of the programme 'Breakfast with Pete Morgan'.

Tim Owen was interviewed by Annie Othen on 13 May for BBC Warwickshire & Coventry. This was repeated.

John Murray was interviewed by Radio Ulster's Talkback show on 10 May.

• **Kimralingva intervjuo**

Loka radiostacio disaŭdigis intervjuon (<http://news.bbc.co.uk/1/hi/england/8682091.stm>) en la kimra lingvo la 14an de

Internacia Amikeca Renkontiĝo

The Friars, Aylesford, Kent 15-18 oktobro 2010

- En antikva monaĥejo apud rivero en bela parko kun lago kaj florgardenoj, oni faros teamlaboron, ĝuos ludojn, aŭskultos prelegojn, kantos, promenos ...
- Kosto de tri tranoktoj kun ĉiuj manĝoj por unuopulo £162, por duopo £155,25. Eblas aliĝi por malpli da tempo.
- Petu pliajn informojn kaj aliĝilon de s-ino Anica Page, 7 Hamp-ton, Great Holm, Milton Keynes MK8 9EP. Tel. 01908 564004.



• **Vizitoj al Brazilo:** Dum majo Lenio Marobin faris prelegon ĉe la Gaúĉa Esperanto-Asocio en la sud-brazila urbo Porto Alegre. Post lunĉo en restoracio kun lokaj esperantistoj, li vizitis ilian sidejon, kie li prelegetis pri pluraj temoj al ĉirkaŭ 20 personoj. La partoprenantoj interesiĝis pri la angla lingvo, vivsistemo en Britio, brita politiko, Ŝekspiro. Pro la multaj demandoj lia restado ĉe la klubo daŭris kvar horojn. La unua foto (supre maldekstre) montras parton de la estraro de Gaúĉa Esperanto-Asocio en la biblioteko; Lenio estas la tria de maldekstre.

Fine de marto Geoffrey Sutton vizitis Brazilon, kie en la urbo Rio-de-Ĵaneiro li partoprenis en klubkunveno de Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE). Supre dekstre bildiĝas renkontiĝo de kluba kurso en Niterói, urbo apud Rio; parolas Aloísio Sartorato, Delegito de UEA por Rio. Tie Geoffrey estis invitita paroli i.a. pri la brita movado kaj sia priliteratura enciklopedio. En la suba bildo maldekstra videblas la surstrata reklamŝildo de KKE, kaj en la dekstra (de maldekstre) Aloísio Sartorato, Palestra Aragon kaj Geoffrey en ĉi ties sidejo.



kelkaj bibliotekoj, privataj kolektantoj. Novaj kontaktoj estas bonvenaj: <esperanto-zentrum@web.de>.

Uzantoj havas komputilon, aliron al la interreto, kopiilon kaj aliajn teknikajn ilojn je dispono.

Aprata 'Esperanto-ekspozicio' kun ĉirkaŭ 40 tabuloj kun historiaj materialoj, nuntempaj varbiloj pri uzablo, uzado de Esperanto, kulturo, muziko, literaturo ktp. pruntcele estas je dispono por GEA-grupoj.

• **Someraj kursoj en Svedio**
Ekde la 13a ĝis la 21a de julio okazas kursoj sur pluraj niveloj en Esperanto-kursejo, Lesjöfors, Svedio (meze inter Stokholmo kaj Oslo) – ankaŭ kursoj pri

esperantologio, tradukado de kantoj k.a. Vidu: www.esperanto.se (ligilo sub 'Aktuell!'); retadreso: kurs.garden@esperanto.se.

• **Itala kongreso**
La 77a Itala Kongreso de Esperanto okazos en Linjano Orsabra de la 21a ĝis la 28a de aŭgusto. Pliaj informoj ĉe retpaĝaro <http://italakongreso.esperantoitalia.it>; retadreso: esperanto@edistudio.it. Respondeculo: Bruĉjo Kasini, tel. 050 982955, +39 329 7463600, +48 694 681873.

• **Geedziĝi en Esperanto**
Unu el la plej novaj servoj proponataj de Herzberg, la 'Esperanto-urbo' en Germanio, estas Esperantlingvaj geedziĝaj

ceremonioj en la bela kavalira salono de Kastelo Welf.

La hejmpaĝo pri Herzberg kaj Esperanto nun estas en dek kvin lingvoj: <http://esperanto-urbo.de>.

• **Invito al Sarajevo en oktobro**
De la 29a ĝis la 31a de oktobro ĉi-jare oni okazigos 'Rondan Tablon' pri la temo 'Eŭropa Unio – hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ. Lingvaj kaj kulturaj aspektoj'. Oni per tio deziras festi la centjarigon de la bosnia Esperanto-movado. Kadre de la aranĝo oni planas inaŭguri novan sidejon de la Ligo kaj solene prifesti la jubileon. Oni invitas eventualajn prelegontojn sin baldaŭ anonci, por kiuj oni konsideros repagon de vojaĝ- kaj restadkostoj. La organizanto kaj

kontakt-adreso estas: Esperanto-Ligo de Bosnio-Hercegovino, BA-71000 Sarajevo, Kralja Tvrtka 19 (pf 452); tel/faksilo: +387 33 537 119; ret-adreso: fetah.zvirac@energoinvest.com. (Informis sekretariino Vildana Delali.)

• Podkasto el Urugvajo

Radio Aktiva refoje informis pri siaj lastatempaj podkasto, aŭskulteblaj per elŭtado el ilia retpaĝaro: <<http://radioaktiva.esperanto.org.uy/2010>>. Laŭdire, materialo por aŭskulti kaj spekti abundas kaj estas tre diversa. Viajn komentojn oni bonvenigas. Retadreso: info@radioaktiva.uyserv.com.

• Nova diplomverko pri Esperanto en Rusio

La 31an de majo 2010 en Jekaterinburg, juna studentino Arina Osipova diplomiĝis pri la temo "Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de la germana lingvo". Ŝi studis en la Urala Ŝtata Pedagogia Universitato, Instituto de Fremdaj Lingvoj.

Jam profesia instruistino de la germana, Arina Osipova lernis Esperanton antaŭ kvar jaroj, kaj kiam venis tempo elekti temon de diplomverko, ŝi decidis kunigi Esperanton kaj la studadon.

Baza problemo estis trovi sciencajn gvidanton de la diplomverko – pedagogoj en UŜPU jen timis la temon ĉar nenion sciis, jen ne vidis sencon okupiĝi pri tio. Klariĝis ankaŭ, ke inter la lingvistoj ekzistas opinio, ke la propedeŭtika rolo de Esperanto estas memevidenta, do oni ne devas ion ajn pruvi ĉi-riilate. Krome laŭ ili ne necesas enkonduki Esperanton en altnlernojn kiel devigan studobjekton, ĉar la latina plenumas la rolon de Esperanto.

Arina ricevis, kiel gvidanton, instruistinon de la franca, kiu iam lernis Esperanton, sed rilatas al ĝi neserioze. Krome ŝi ne regas la germanan (pri kiu ĉefe temas en la verko de Arina). Tial

Osipova devis labori memstare, la gvidantino helpis nur pri stilaj nuancoj kaj organizaj aferoj.

Arina faris jenan eksperimenton: ŝi proponis al 22 esperantistoj kun malsamaj konoj de Esperanto kaj nenioma rego de la germana traduki el la germana apartajn vortojn, apartajn frazojn kaj malgrandan tekston. Por la tuta traduko ŝi liveris al eksperimentatoj 45 minutojn. Rezulte de la traduka laboro evidentiĝis, ke la hipotezo pri la propedeŭtika valoro estas konfirmita kaj la celo atingita.

Osipova ricevis la plej altan poenton; recenzo estis pozitiva. La atesta komisiono ĝenerale rilatis neŭtrale, sed faris bazajn demandojn: kial Esperanto sed ne la angla, ĉu Esperanto helpis lerni la germanan, ĉu Esperanto estas ie lernata kiel studobjekto. Krome oni petis, ke Arina diru ion en Esperanto – ŝi citis la unuajn kvar strofojn de "La Espero" de Zamenhof.

• Magistra disertaĵo pri Esperantaj periodaĵoj

La 25an de majo Dima Ŝevĉenko (i.a. funkciiganto de la retejo www.esperanto.com) defendis

sian magistran disertaĵon pri periodaĵoj en Esperanto, kun la noto perfekta.

Tio okazis en Rusia Universitato de Amikeco inter la Popoloj (unu el ĉefaj rusiaj universitatoj). Lia oponento/recenzanto estis fama esperantisto M.I. Isajev (http://eo.wikipedia.org/wiki/Magomet_Isajev), doktoro, profesoro, akademiano.

Pliaj detaloj – enhavlisto, fotoj kaj komentoj – troveblas ĉe: www.ipernity.com/blog/55113/252420.

• Kursejo Grezijono 2010

Dudek kvin volontuloj el pluraj landoj zorgos pri interesa programo kaj agrabla restado inter al 17a de julio kaj 14a de aŭgusto 2010 en kastelo Grezijono, en la Loire-regiono okcidente de Parizo. Legu pli ĉe www.gresillon.org/spip.php?rubrique8&lang=eo aŭ <http://bertox.free.fr/g/Gresillon2010.pdf>.

• Nova loko por tradicia Eŭropa Rendevuo

Ekde tiu ĉi jaro, la tradicia Eŭropa Rendevuo de Morbecque okazos en Stella-Plage, apud la fama banurbo Le Touquet (30

INFORMADO

PUBLICITY

Publicity card campaign

So far Esperanto House has received 11 requests for cards by members to distribute. Around 3 000 have been sent out, and recently another 350 were taken to Birmingham.

Visitors/students on courses at Barlaston have removed approx. 70 cards from the office.

Simplest publicity work

Clearly, there are a lot of opportunities to distribute the cards, both by individuals and groups. Is it on the agenda of your next group meeting?

• Quantities of cards are available from Esperanto House on request (tel. 0845 230 1887) *free of charge*, provided they are distributed (donations will, of course, be gratefully accepted).

<p>Find out about Esperanto and how to learn it</p> <p>Esperanto is the easiest, fastest and cheapest way to learn a second language. It is spoken worldwide as a second language and is the most widely understood.</p> <p>Esperanto opens up a world of interesting people from all nations and cultures. A great way of meeting with other people – an alternative to social networking sites.</p> <p>Esperanto is also an ideal 'starter' language for learning another language. It enhances your ability to learn.</p> <ul style="list-style-type: none"> • Easier to learn • Transnational • Friends contacts and events worldwide • Hundreds of magazines, books, audio and video courses • The Pajpajti Sermo network offers stay in local people's homes in many countries • Try your first lesson at www.learn-esperanto.com 	<p>Please send me your free Information Pack on Esperanto, without obligation.</p> <p>Contact: EAH, tel: 0845 230 1887 e-mail: eah@esperanto.org or find us at www.esperanto-gh.org or www.esperantoduction.com</p> <p>Name: _____ Address: _____ Postcode: _____</p> <p>Please also tick if required: <input type="checkbox"/> enrol me in the free 'taster' course <input type="checkbox"/> send information on residential courses <input type="checkbox"/> ask someone local to contact me.</p> <p>My tel. no.: _____ e-mail: _____</p>	<p>Stamp</p> <p>Esperanto Association of Britain Esperanto House Station Road Barlaston STOKE-ON-TRENT ST12 9DE</p>
---	--	---


kilometrojn sude de Bulonjo-ĉe-Mar) en bela moderna kaj komforta feriejo Stella-maris ekde la 13a ĝis la 14a de novembro 2010. Ĝi estas la plej grava internacia semajnfino en Francio norde de Parizo. La respondeculoj estas Arlette kaj Edmond Plutniak; retadreso: edmond.plutniak@free.fr; retpaĝaro: <http://arrasesperanto.free.fr>.

• **Praktiki/staĝi en Germanio**
Interkultura Centro Herzberg (ICH) ofertas favorajn kondiĉojn al praktikanto, aŭ staĝanto – prefere por minimume unu monato aŭ pli longe – ekde aŭgusto 2010. Sinproponoj bonvolu sendi al ICH kun viv-historieto, mencio de lingva nivelo, praktikaj kapabloj kaj celoj. Aĝlimo ne estas. ICH, D-37412 Herzberg/Harz – la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6. Tel. +49/(0)5521-5983.

• **Esperanto-flagoj aĉeteblaj**
Laŭdire bonkvalitaj Esperanto-flagoj estas haveblaj en kvar diversaj grandecoj. Petu de Interkultura Centro Herzberg (D-37412 Herzberg/Harz – la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6. Tel. +49/(0)5521-5983). Grandecoj varias ekde eta flago, kun la vorto 'Esperanto', kun bastono kontraŭ €4, 60 x 90cm kontraŭ €6, 90 x 150cm kontraŭ €9, ĝis flagego de 150 x 250cm kontraŭ €39. Poste la prezoj kredeble altiĝos.

• **Seminario por instruantoj**
Torpedo-6 (ILEI-seminario), por instruantoj kaj estontaj instruemuloj, okazos de la 8a ĝis 12a de oktobro 2010. Se vi interesiĝas kontaktu Interkulturan Centron Herzberg, D-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr. 6. Tel. +49/(0)5521-5983.

• **"Malkovrenda retejo"**
Oni ŝajnas entuziasmi pri la nova retejo www.esperanto-tra-la-



William Auld – Master Poet of Esperanto

de Girvan McKay

• Enhavas versiojn en la angla, skota kaj gaela de la tuta teksto de *La infana raso* / includes the entire text of *La infana raso* in English, Scots and Gaelic.
• Ĉi tiu libro nun estas akirebla (de la entrepreno LULU – www.lulu.com, aŭ de Girvan McKay – esperantolit@gmail.com) kaj bindita kaj broŝurita. La molkovrila estas kompreneble iom malpli kosta ol la malmola / This book is now available (from LULU Enterprises – www.lulu.com, or from Girvan McKay – esperantolit@gmail.com) both in hardback and in paperback.

The price of the paperback is, of course, somewhat lower than that of the hardback.

• The book may be ordered online at <www.lulu.com> in North Carolina, USA (searching by 'Books - Title - Author - Ireland - English'). 279 pages on white paper, hard cover, green dust cover. Price: £18.37 + p. & p. Bulk orders reduce the postage and packing costs.

mondo.net el Morlaix, Bretonio. Rubrikoj kaj subrubrikoj ebligas pli rapide trovi tion, kion oni serĉas. Evidente, ĝi ne estas kompleta kaj neniam estos tia pro tio, ke konstante evoluas kaj disvastiĝas la uzado de la lingvo. Sekve, la iniciatintoj esperas ricevi rimarkojn, atentigojn, korektojn, proponojn por aldono. Oni skribas i.a.:

"Tiu ĉi retejo estas pordo al kelkaj indaj retejoj, kiuj rilatas al Esperanto ..., aŭdvidaj podkastaj blogaj retejoj, iloj, kursoj pri Esperanto, retaj gazetoj, librejoj, bibliotekoj, politiko, sindakismo, lingvistiko, landaj kaj regionaj personaj retejoj, religio, filozofio kaj muziko. Nia teamo celas forigi la paĝojn 'ERROR-404-NOT FOUND' – Helpu nin."

• **Kolektejo-arkivejo por diplomlaboraĵoj**

Sekve de propono krei arkivejon retan, kiu prezentu diplomlaboraĵojn, kio utilis en nia argumentado dum reagoj, varbadoj ks., Katalin Kovats reagis, ke en la retejo <<http://edukado.net>> oni jam komencis kolekti la laboraĵojn. En la nova paĝaro aparta sekcio okupiĝos pri tio, uzante la klasifikon de Edward Symoens, kaj enretigante la enhavon de liaj du libroj pri tiu temo.

La paĝaro donos serĉeblon, informojn pri la laboraĵoj kaj alŝutos tiujn, kiujn oni sukcesis akiri komplete aŭ nur resumon.

En la platformo eblos, ke la aŭtoroj mem alŝutu kaj klasifiku

Daŭrigo sur paĝo 21



Advertise Esperanto while you shop

with this dark blue printed 100% cotton bag, designed by Tim Owen for the British Congress in Llandudno.

• Now available from Esperanto House for just £2.00 (+ p.&p. of £1.20) = £3.20.

The bag has a height of 16" and is 15" wide.

A selection of goods from the bookshop

Please add 15% for postage and packing – minimum postage cost £1.50. Please make cheques payable to EAB or phone Esperanto House on 0845 230 1887 to make a purchase by debit (or credit) card. Go to <http://www.esperanto-gb.org/eab/bookcat.htm> for the full list of goods. EAB's stock is limited by space, but we could order a special title for you from UEA and let you pay EAB in sterling.

Beletra almanako 7 *NEW* ed. J. Camacho, P. Dasgupto, I. Ertl. New York: Mondial, 2010 (Feb.). 139p., 22 cm, illus. Original and translated prose, original poetry, debate, essays and reviews. £9.30

Esperanto Mini-Course Barlaston: EAB, 2009. 32p., 15cm. A compact set of ten lessons based on the popular *Esperanto for Beginners* by Montague Butler. £1.80

Esperanto Mini-Grammar *NEW* Barlaston: EAB, 2010. 64p., 15cm. A convenient pocket grammar, giving a clear, compact and non-technical overview, alphabetically arranged with explanations and examples of usage. £1.80

Esperanto Mini-Trio (pack) *NEW* Barlaston: EAB. The Esperanto Mini-Course, Mini-Dictionary and Mini-Grammar books, bundled together at an attractive price. £5.99 (incl. p. & p.).

Mini-Curs Esperanto *NEW* Harry Barron Barlaston: EAB, 2010. 36p., 15cm. A guide for Welsh-speakers containing ten lessons, some reading exercises and a vocabulary. £1.50

Metodiko de la Esperanto-instruado Rudolf Rakuša. Roterdamo: UEA, 1991. 189p., 20cm. 1991 (3a eld.). Baza pedagogia gvidilo por instruantoj de la internacia lingvo. £4.75

Pasporta Servo (2010) *NEW* Roterdamo: TEJO, 2010. 208p., 15cm, illustrated. Printed directory of hosts in www.pasportaservo.org; 1,450 addresses in 91 countries, with maps. £8.00

Traduku! William Auld Barlaston: EAB, 2004. 116p., 21cm. Fifty-six translation tasks (originally in past issues of *The British Esperantist*). The first section presents the tasks, the second section the extensive comments and the model translation. Includes an index of relevant words and discussion points. An excellent book to hone translation skills. £7.00



MUSIC

Al la ĝojo (CD) Beethoven & Kalocsay Toyoake: Beltono, 2004. 65p., 26cm. The choral symphony no. 9 op. 125 by Beethoven with piano accompaniment. Words by Kálmán Kalocsay. £5.10

Amu min (CD) Jomart & Natasa Spanga, 2003. 44 min. 12 songs, written by Mikaelo Bronštejn. Includes booklet of lyrics. £14.80

Imagu! (cassette) John Douglas London: 1987. 38 min. Twelve 20th-c. and traditional songs. £4.00

JoMo friponas (CD) JoMo Donneville: Vinilkosmo, 2001. 42 min. An eclectic collection of 14 songs in a variety of styles. Some are translations ('Ĉu vi volas danci', 'La Bamba'), others originally written in Esperanto. Includes booklet of lyrics and photos. £12.70



JoMo slavumas (CD) JoMo Donneville: Vinilkosmo, 2006. 70 min. 24 tracks of music adapted from or inspired by a variety of eastern European styles. £15.65

JomArtajoj – la ruĝa albumo (CD) *NEW* Jomart & Nataša Stokholmo: JomArt, 2009. 35:44 min., 12 tracks. New performances of some of Jomart kaj Nataša's best-loved songs. £20.50

Kajto! (CD) Kajto The first collection of songs from the popular Dutch group. £11.50

Kompil' vol. 1 (cassette) Donneville: Vinilkosmo, 1995. 59 min. A compilation of performances by top musicians, including Kajto, Persone, Solo, etc. Fifteen groups in all. £5.76

Londono kantas (CD) Londono: Londona Esperanto-Klubo, 1983. 51 min. Twenty popular songs sung by the London Esperanto Choir. Includes a 12-page booklet of the words. £4.00

Lokomotivo, rulu nun! (CD) Kajto Drachten: Windrose Music, 1994. 51 min. Fifteen songs about trains. Includes booklet. £9.99

Masko (CD) Kajto Donneville: Vinilkosmo, 1999, 28 min. Ten songs from the popular Dutch group. £14.00

Milan Dočekal el la grupo TEAM kantas (ne nur) en Esperanto (CD) Slovakia: Martin, 2007. 21 min. Three pieces in Esperanto and three in Slovakian. £12.00

Plaĉas al mi (CD) Kaj tiel plu Donneville: Vinilkosmo, 2004. 45min. Sixteen medieval-style musical pieces, in styles Catalanian/ Occitanian/ Sephardic/ Andalusian. Includes text booklet. £14.35

Procesio multkolora (CD) Kajto Drachten: Flugdrako, 1991. 48min. 18 songs from the popular Dutch group. Text booklet included. £11.50



Rapida vojo (CD) Sylla Chaves Rio-de-Ĵaneĵro: 2001. 58min. An introduction to Esperanto through songs, dialogues and poems. (Order accompanying booklet separately.) £6.30

Rapida vojo (book) Sylla Chaves Rio-de-Ĵaneĵro: 2001. 12p. Booklet to accompany the CD. £2.31

Sojle de la klara temp' (CD) Kaj Tiel Plu Donneville: Vinilkosmo, 2000. 29min. Folk music from Catalonia and Occitania in medieval style. £12.40

Tohuvabohuo (CD) Kajto Drachten: Flugdrako, 1993. 60 min. The popular Dutch group. Text booklet included. £8.00

Venos liber' (cassette) Marcela Pisa: 1979. 12 protest songs, mainly from the Basque country. £5.76



La beletra revuo FONTO (1989–2006) (DVD) *NEW*

This DVD-ROM (computer disc) holds the complete collection of the literary review *Fonto*, scanned and reproduced with the kind permission of *Fonto*'s initiator and publisher, Gersi Alfredo Bays. Each of the 312 issues (from Vol. 1 No. 1 Oct. 1980 through to Vol. 26 No. 312 Dec. 2006) – 11,812 pages in all – can be viewed in any web-browser; they are stored on the disc as a set of HTML menus and indexes, linking to the individual pages stored as JPEG images. An alternative presentation as PDF files is included, and may be more convenient for reading on, for example, an e-reader/e-book appliance. £10 (£8.51+ 1.49 VAT), p. & p. £1.

Lastatempa agado

www.jeb.org.uk

Dum la pasintaj tri monatoj – dum printempo fariĝis somero – JEBanoj ĉeestis Esperanto-aranĝojn en diversaj partoj de Britio, proprajn kaj tiujn de aliaj grupoj.

Je la fino de marto kunvenis la Londona Esperantista Junularo, laŭokaza grupo por 'babilado, amuziĝo kaj eĉ vortar-interŝanĝo', laŭ la eventa pri-skribo ĉe Facebook. Deko da junaj esperantistoj, kiuj loĝas en aŭ ĉirkaŭ nia ĉefurbo – kaj inter ili estas membroj de JEB (veraj kaj honoraj) – partoprenis en tiu aranĝo en High Holborn. Pli nordaj JEBanoj ne tute maltrafis esperantumadon dum la printempo: Tim, Clare kaj Rolf ĉeestis aprilan kunvenon de la Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio en Preston, kie Terry kaj Anica Page parolis pri kiel internaciaj paroj povas kune loĝi. Ili ankaŭ postkunvenis en la jorkŝira urbo Halifakso: la Milito de la Rozoj certe ne ekzistas en Esperantujo!

Plej sukcesa kunveno

La plej sukcesa kunveno por JEB estis la Brita Kongreso de Esperanto, kiu okazis en alia lando ol



La foto reliefigas du JEB-anojn – Paul Roberts kaj Rob Hawkins – en trinkejo post la distra vespero ĉe la Brita Kongreso en Llandudno.

la du pasintaj: Kimrio! Dek unu JEBanoj kaj 'alunoj' – honoraj JEBanoj, kiuj superas la oficialan aĝlimon – partoprenis tiun aranĝon en la bela ĉemarborda urbo Llandudno kaj ĝuis la etoson de Esperantujo, la freŝan

aeron kaj ... la trinkejojn ... 'Esperantujo troviĝas en trinkejoj', laŭŝajne. Aŭ ĝi estus tie, se oni (t.e. mi, 29-jarulo) rajtus aĉeti iun ajn trinkaĵon! Krom tio, ni havis produkteman jar-kunvenon, dum kiu nia nova administra komitatano Rob Hawkins elektigis, kaj ni diskutis novajn ideojn pri nia interreta



Kvankam la pliparto de nia lastatempa agado okazis en Britio, unu el ni – Guy Johnston (en la foto maldekstre) – faros multon eksterlande. Krom sia elektigo al la Administra Komitato de TEJO kiel Komitatano B, li baldaŭ eklaboros por jaro en Bjalistoko ĉe la tiea Esperanto-asocio kaj la Zamenhof-Centro, kiu estas kaj muzeo kaj publika Esperanto-biblioteko. Dum tiu tempo Guy ankaŭ gvidos kursojn en la lingvo, kie ĝia iniciatinto naskiĝis kaj plenkreskis.

ĉeesto kaj kiel antaŭenigi Esperanton inter gejunuloj. Nia honora prezidanto, Tim, estris ankaŭ kelkajn diskutrondojn – la famajn ‘dronojn’ – dum la kongreso, kaj iom antaŭ ĝi lin intervjuis BBC Radio Warwickshire pri Esperanto.

Kune en Jorkŝiro

Dum la somero JEBanoj ĉeestos aranĝojn ekster Britio, ekzemple FESTO en Francio, la danan muzikfeston de Roskilde kaj la slovakon Someran Esperanto-Studadon. Sed por tiuj, kiuj ne volas vojaĝi tro multe – kaj eble male – la somera JEB-renkontiĝo okazos en la bela urbo Jorko je la 26a kaj 27a de junio. Dum tiu semajnfino okazos ankaŭ kunveno de la Federacio Esperantista de Yorkshire kaj Humberside, kie

EAB-Prezidanto Profesoro John Wells prezentos kaj gvidos tuttagan programon pri la temo “Kiel ekspluati la vortprovizon de Esperanto”.

Tujbabilejo

Diversaj sociaj retejoj – inkluzive de niaj JEB-forumoj, Facebook kaj Tvitero – plej ofte estas la organiziloj por niaj renkontiĝoj. Post propono ĉe nia jarkunsido en Llandudno, JEB nun havas sian retan tujbabilejon: tie oni povas babili realtempe kun aliaj junaj Esperanto-parolantoj kaj plibonigi sian scion de la lingvo. Ĉiujn oni povas trovi per nia retejo ĉe www.jeb.org.uk aŭ la Tviterejo ĉe http://twitter.com/Esperanto_UK.

Mikeo Seaton

• Esperanto in TUC Library

A visitor researching in the TUC’s collections thought you might like to be aware of the small collection of Esperanto materials in their holdings. Go to their catalogue at <http://catalogue.londonmet.ac.uk/> > enter ESPERANTO as Keyword search.

• Venezuela enretigo

La gazeto *Venezuela Stelo* de Venezuela Esperanto-Asocio estas elŝutebla per la retpaĝaro www.esperanto-venezuela.org/files/Venezuela%20Stelo%2084.pdf. □

The Esperantic Studies Foundation

welcomes funding proposals for research that furthers understanding of interlingualism or tests its applicability to particular settings, for instance in an educational institution, international organisation or online community.

Submission guidelines may be found under the Interlingual Research Grants programme:

www.esperantic.org

Daŭrigo de sur paĝo 17

siajn laboraĵojn, kio multe helpas en la ellaborado de datumoj kaj serĉfunkcioj.

Grandan kampanjon por la projekto oni lanĉos post ĉirkaŭ du monatoj, kiam la paĝaro jam funkcios en sia plena formo. Oni kalkulas je ĉies subteno kaj kunlaboro.

Refoje notindas ĉi-rilate la listo de oficialaj Esperanto-kursoj en supera instruado tra la mondo, kiun Germain Pirlot el Belgio kompilas jam dum jaroj: www.freeweb.hu/egalite/listo/listindex.htm aŭ www.ipernity.com/blog/32119/234890.

• Esperanto en la Olimpikaj Ludoj de Rio en 2016

La brazila Esperanto-movado mobiliziĝas por prepari kampanjon favore al la Internacia Lingvo dum la Olimpikaj Ludoj, okazontaj en 2016 en Rio-de-Ĵanejro. Bonvena estos kunlaboro el la tuta mondo por

informi sportajn mediojn, kiel ankaŭ la partoprenontajn sportistojn. Bonvolu anonci vian kunlaborpretecon al Renata Ventura per malplena mesaĝo al: lernantino.cxiamo@gmail.com; retejo: www.olimpikoj.blogspot.com.



– Mi vidas, ke via glaso estas malplena. Ĉu vi petas ankoraŭ unu?
– Ba, tute ne! Kion mi faru per du glasoj malplenaj? (El *Juna Amiko*.)

Local BBC service previewed Preston meeting with two interviews

The North West Esperanto Federation held its spring meeting in the Empire Services Club, Preston, on 17 April. BBC Radio Lancashire previewed the meeting with two interviews on Friday, 16 April with Paul Gubbins, and the following day with guest speaker Terry Page.

Terry and wife Anica did a joint presentation at the meeting entitled "Reciprokalaj Interkonsentoj: kiel vivadi kun alinaciul(in)o" in perfect matrimonial harmony. (Photos by Peeter Aitai.)

Right: Guest speaker Terry Page (left) during a break.
Below: Paul Gubbins (left) addresses the Preston meeting.



Nekrologoj

Mortis la 5an de marto, 93-jaraĝa, **Fred Holden**, longdaŭra membro de la Bradforda grupo.

Dum multaj jaroj li laboris en la grupo kiel prezidanto kaj 12-lectiona kursgvidanto, kaj en la federacio kiel sekretario kaj prezidanto. Li havis respondecojn en la universala kaj brita kongresoj en Harrogate.

Pro sia sanstato, kaj Fred kaj la karmemora edzino Olive pasigis la finajn jarojn en prizorgejo.

Pli ampleksa nekrologo aperas en *La Blanka Rozo*.

Muriel Shackleton,
Grupsekretario, Bradford

Forpasis la 22an de februaro, 80-jara, **Marjorie Pitt**, esperantistino, kiu dum multaj jaroj loĝis en Leominster. Ŝi kun edzo Arnold esperantistiĝis en 1969, kaj en la somero de 1970 partoprenis en Esperanto-feriado en Hungarujo per aŭto de la marko Morris Minor. Tiu estis la unua el multaj vojaĝoj eksterlande per kaj por Esperanto.

Marjorie estis ano de la Loka Kongresa Komitato por la Brita Kongreso de 1987 en Abergavenny kaj por la konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en 1989. Dum malfacila periodo ŝi estis kontistino por la Esperanto-Hotelo en Morecambe. Ŝi estis entuziasma trikanto kaj donis multajn trikaĵojn por Esperantaj almozaj fondaĵoj. Sed ŝi ĉiam preferis doni kaj labori anonime, en la fono kaj lasi al aliuloj fanfaroni.

Ŝi prononcis Esperanton tiel internacie, ke eĉ spertuloj ne povis identigi, de kiu lando ŝi venas.

Dum lastaj jaroj, pro malsaneco, ŝi malmulte aktivis, sed avide legis *La Brita Esperantisto*, *EAB Update* kaj revuon *Esperanto* de UEA.

Arnold Pitt

Kimra agendodato

Esperanto-Federacio de Kimrio renkontiĝos sabaton, la 4an de septembro en Aberystwyth. Detaloj haveblas de Hilary Chapman, tel. 01492 583420.

New Members of EAB

Mr R. Brawn, Guildford
Timothy Carr, Cheshire
Ms Bryony Freeman, London
Alexander Jarvis, Aberdeen
Mrs Kimie Markarian, Brentwood
Steven Medgyesy, Chellaston
Ms P. Nicholas, Basildon
Paul Roberts, Surrey
Mrs Barbara Taylor, Salford
Harry Taylor, Salford

Deceased Members

Norman Divall, Plymouth
Dr Marjorie Flint, Beverley
Harry Mather, Bournemouth
David G. Mumford, Ryde
Rita Thyer, Llanyrafon

Completed the Free Postal Course

Mrs C. Bunting, Basingstoke
Amelia Clewett, Oswestry
Clive Grey, Ferndown, Dorset
Elaine Thornton, Ilkley

Esperanto-kurso en Brighton

Aneta M. Bedkowska informis, ke en aprilo komenciĝis Cseh-metoda Esperanto-kurso en Brighton. Kvankam la nombro de la gestudentoj estas malgranda, pozitiva flanko estas, ke ĝi okazas en publika loko per publika organizaĵo, kio espereble helpas disvastigi informojn tra la urbo por la venonta fojo. Informoj pri la kurso haveblas papere en ĉiuj komunumaj centroj de Brighton, kaj en la interreto: www.bucfp.org/courses/Course%20Booklet.pdf.



Esperanto Parliamentary Group

After the General Election the Esperanto Parliamentary Group (EPG) needs to form again with a new membership. The group will campaign for expansion of the teaching of Esperanto in UK schools. Brian Barker requests that you contact your local MP and ask him or her to join the EPG.

The website www.youtube.com/watch?v=7H4hfuYvUI4g shows how Esperanto is already taught in many schools worldwide.

Please let us know how you get on! Contact Brian Barker by e-mail to bribarker@hotmail.co.uk or through the EAB office.



Sud-Londonaj kunvenoj: Jen (plej supre) foto farita dum Krespo-Festo en la domo de s-ino Grietje Buttinger la 13an de februaro, kaj (supre) foto ĉe la Paska Festo la 10an de aprilo (fotis Joanna Xie.)



Maldekstre: *Sud-Lankaŝira Esperanto-Grupo* dum sia junia kunveno en Southport. Ĉirkaŭ la tablo sidas Richard Phoenix, Jim Voiels, Peeter Aitai, Brendan Marsh, Andrew Wheatley kaj Vivienne Isherwood.

Oni vidis televide la Papon, kiam li parolis Esperanton je Pasko, kaj aŭdis Paŭlon Gubbins radie. Juna membro Brendan ludis sian violonon. Oni diskutis la ĵusan Britan Kongreson, laŭtleĝis la ĉi-someran programon de la franca kursejo Kastelo Grezijono, decidis pri la kluba somera tagmanĝo kaj venis al interkonsento pri la dato por la jarkunsido.

John C. Wells

etern/a el/sut/i
kimĉi/o eternal tofu/o download
kimchi klav/ar/o am/o
skan/i keyboard zink/o love
scan (with a scanner) zine
aŭd/i mov/ad/o
Wikipedia
Paralimpik/oj spam/o
shoe
skrib/i
strong write
silk/o ard/a jog/o turmeric
Silk ardent yoga intensa
sensive
gard/i ak/a
sharp high, tall

English Esperanto English Dictionary

MONDIAL

Ĝus eldonita! Ĝisdatiĝu per

John C. Wells

English–Esperanto–English Dictionary (Angla–Esperanto–Angla Vortaro)

Ampleksa sed konciza ambaŭdirekta vortaro por komencantaj kaj progresintaj studentoj de Esperanto, kun enkonduka prezento de la gramatiko de Esperanto


Unue publikigita en 1969 de la eldonejo Hodder kiel *Teach Yourself Concise Esperanto and English Dictionary*, la nuna, dua eldono estas zorge reviziita kaj komplete reverkita. Ĝi plene spegulas la hodiaŭajn anglan lingvon kaj Esperanton.

Kun entute pli ol 30 000 kapvortoj, ĝi estas nemalhavebla riĉfonto por uzantoj de Esperanto, tenanta ĉiujn vortojn, kiujn oni bezonas, inkluzive de multaj fakvortoj.

Eldonas: Mondial (Novjorko), 2010 (Broŝurita versio:

ISBN 978-1-59569-149-1; Malmole bindita versio kun kromkovrilo: ISBN 9781595691507). Ambaŭ: 508 paĝoj (xlvi + 462). Grando 5.5 x 8.5" (14 x 21,6 cm). Por pli da informoj vizitu la retpaĝaron: www.librejo.com/wells-vortaro.

• *Vendoprezoj ĉe EAB*: £15 (broŝurita) kaj £29 (bindita), plus sendokostoj je 15%. Reta butikto: www.fastcart.co.uk/cart/index.php?id=9449&item=Wells+Dictionary – aŭ telefonu al 0845 230 1887.



From the EAB Bookshop

Jen nia mondo 1 (book) J.C. Wells et al.
London: EAB, 2005 (2nd ed.). 66p., 21cm. Textbook for this beginners' course with amusing dialogue, lessons 1–12. £6.00

Jen nia mondo 2 (book) J.C. Wells et al.
London: 1979. 89p., 21cm. Textbook for the follow-on course, lessons 13–25. £4.00

*SPECIAL OFFER!

**Jen nia mondo 1 & 2 package (6 CDs)* J.C. Wells Barlaston: EAB, 2005. 336 min. Buy both sets of CDs together (6 CDs) and save money. £22.00

**Jen nia mondo 1 & 2, la dialogoj (CD)* J.C. Wells Barlaston: EAB, 2007. 72 min. (Just) the 25 dialogues from the lessons of the Esperanto language courses *Jen Nia Mondo 1 & 2*. Not the same as the *Jen Nia Mondo 1 & 2* 6-CD set, which is far more comprehensive. £5.00

Please add 15% for post and packing. Minimum postage cost £1.50. Please make cheques payable to EAB, phone Esperanto House on 0845 230 1887 to make a purchase by debit (or credit) card or online at www.esperanto-gb.org.